

Babilada rondo

... okazas je la 19-a ĉe unu aŭ la alia el la esperantistoj, kiuj deziras plibonigi sian lingvon parole. Ĉiuj konsentas korekti unu la alian. Poste, ni kune manĝas la «kanadan» piknikon alportitan de ĉiu.



La venonta renkonto okazos **ve, la 9-an de marto**
...ĉe Monique k. Giulio
Ecole de Commerce 3
1004 Lausanne
monique.golaz@bluewin.ch
021 646 42 78
079 754 21 60

Aliĝu al «Doodle» por la venontaj babiladaj rondoj :
www.doodle.com/iffkkw7undkzfz8p

Venu multnombraj!

La membroj de LES tre bonŝancas!

Instruisto emerita, esperantisto honorata tra la mondo, kreinto de la *Gaconda Metodo*, aktiva gardisto de la memoro pri planlingvoj (CDELI) kaj - ne finfine - fakulo pri la lingvo esperanto kaj aparte pri ĝia gramatiko, Claude Gacond venos en Laŭzanon por klarigi al ni ... pri gramatikaĵoj.

Ne hezitu, profitu, venu kun viaj demandoj, problemoj, nekomprenaĵoj. Certe neniu el tiuj demandoj estos konsiderataj kiel stultaj, malinteresaj, ĉar Claude certe alportos utilajn klarigojn per afiŝoj, kiuj nun retroveblas sur lia retejo :

www.esperanto-gacond.ch

Laŭzana Esperanto - Societo

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22
+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 647 29 28
esperanto@citycable.ch * www.esperanto.ch/Lausanne
Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Bühlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: Francisko Randin * 076 411 14 55 - Kasisto.: Knud Sunier 021 961 38 56

Laŭzana Esperanto - Societo

Informilo

Marto 2012 - n° 03

Lunde la 5-an de marto 2012,
je la 20-a, ĉe la unua etaĝo de la stacidoma bufedo.

Claude Gacond
klarigos al ni pri la rolo de la sufiksoj
...ig... kaj ...iĝ...
kies uzo malfacilas por ni, franclingvanoj.

Lunde la 2-an de aprilo

Preparado de la ekspozicio en Vevey (Magasin du Monde) sub la respondeco de Karlota

Lunde la 7-an de majo

Decidota

Sabate la 16-an de junio

Ekskurso

Lunde la 3-an de septembro

Decidota

Lunde la 1-an de oktobro

Decidota

Lunde la 5-an de novembro

Decidota

La varma kaj tenera fabelo pri la varmaj tenerdolĉaĵoj

de Claude M. Steiner tradukita de Evelyne Chibleur kaj Kvinpetalo

Iam, en la iamaj tempoj, Timoteo kaj Margareta feliĉege vivis kun siaj gefiloj, Karlota kaj Valenteno. Por kompreni kiel feliĉaj ili estis, necesas kompreni la tiaman vivon.

Ĉiu naskiĝanto ricevis sakon plena de varmaj tenerdolĉaĵoj. Ne eblas diri la nombron ĉar ne eblas kalkuli ilin. Neelĉerpeblaj ili estis. Kiam iu metis la manon en sian sakon, li aŭ ŝi ĉiam trovis varmajn tenerdolĉaĵojn. Tre ŝatataj estis la varmaj tenerdolĉaĵoj. Kiam iu ricevis ilin, li aŭ ŝi sentis sin varma kaj dolĉa en la tuta korpo. Kiuj ne regule ricevis ilin havis dorsdoloron, ŝrumpiĝis, kaj foje eĉ mortis.

En tiu tempo estis facile akiri varmajn tenerdolĉaĵojn. Kiam iu bezonis unu, li aŭ ŝi alproksimiĝis al vi kaj petis : « Mi ŝatus unu varman tenerdolĉaĵon »

Tiam li elprenis el la sako iun varman tenerdolĉaĵon ne pli granda ol infanpugno. Tuj kiam la varma tenerdolĉaĵo estis ekstere, ĝi ekridetis kaj ekfloris en granda lanuga varma tenerdolĉaĵo. Tiam vi metis ĝin sur la ŝultron, la kapon aŭ la genuojn kaj ĝi kareseme buliĝis ĉe la haŭto disradiante varmon kaj agrablajn sensaĵojn tutkorpe. Homoj senĉese interŝanĝis varmajn tenerdolĉaĵojn. Oni povis akiri tiom, kiom da oni bezonis ĉar ili estis senpagaj. Pro tio preskaŭ ĉiuj vivis feliĉaj kaj sentis sin varmaj kaj dolĉaj.

Mi diras « preskaŭ » ĉar iu estis ege malkontenta vidante homojn interŝanĝi varmajn tenerdolĉaĵojn : la malbona sorĉistino Belzefa estis ege kolera. Homoj estis tiel feliĉaj, ke ili ne plu aĉetis al ŝi magiajn trinkaĵojn, nek pociojn.

Ŝi decidis, ke tio nepre devis ĉesi kaj imagis ege malican planon.

Iumatene Belzefa alproksimiĝis al Timoteo kaj murmuris ĉe lia orelo dum li rigardis Margaretan kaj Karlotan ĝoje ludantajn.

Ŝi susuris : «Ĉu vi ne vidas kiom da varmaj tenerdolĉaĵoj Margareta donacas al Karlota ?

« Se tio daŭros ne plu restos io por vi ».

Timoteo ekkriis : « Ĉu tio signifas, ke ne plu estos varmaj tenerdolĉaĵoj en la sako kiam oni deziros unu ? »

« Nepre » respondis Belzefa. « Post disdonaco ili malmultiĝas kaj finfine ne plu restos varmaj tenerdolĉaĵoj »

Kaj ridaĉante ŝi forflugis balaile. Timoteo serioze kredis ŝin, kaj de tiam, kiam Margareta disdonacis varmajn tenerdolĉaĵojn al iu, li timis ke ne plu restos io ajn por li. Kaj se la sorĉistino pravis ? Li ege ŝatis la varmajn tenerdolĉaĵojn de Margareta. Pripensante la mankon, li ege maltrankviliĝis, li eĉ koleriĝis.

Timoteo tre prigardis ŝin por ke ŝi ne malŝparu la varmajn tenerdolĉaĵojn al Karlota kaj Valenteno aŭ al iu ajn. Poste li iĝis plendema, kiam Margareta disdonacis varmajn tenerdolĉaĵojn al iu ajn krom al li.

Margareta tiel amis lin, ke ŝi ĉesis disdonaci varmajn tenerdolĉaĵojn al aliuloj. Ŝi konservis ilin nur por Timoteo. Karlota kaj Valenteno konstatis ĉion, tamen opiniis, ke tio estis tre maljusta.

Tre maljusta rifuzi varmajn tenerdolĉaĵojn al la petantoj kaj dezirantoj. Tamen ili ambaŭ komencis atenti pri la propraj varmaj tenerdolĉaĵoj. Ili pririgardis la gepatrojn atenteme kaj kiam la gepatroj multe donacis al aliuloj, ili plendis. Ili estis maltrankvilaj nur pensante pri la malŝparemo de varmaj tenerdolĉaĵoj.

La vivo multe ŝanĝiĝis ! La malicega plano de la sorĉistino bone funkciis ! Kvankam ili abunde ĉiam trovis varmajn tenerdolĉaĵojn en la sako, ili iom post iom donacis malpli kaj malpli da ili kaj iĝis ĉiutage pli ŝparemaj.

(daŭrigota)